

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonajn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

1. NOVAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ
2. LA 15-AN DE DECEMBRO EN LA ĈEĤA RADIO
3. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS
4. KALENDARO DE E-EVENTOJ:
5. BONDEZIROJ

1. NOVAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ

Ni invitas vin legi decembrajn novaĵojn en la ĈEA-retejo www.esperanto.cz

- rubriko Aktualizaĵoj:

a) La 4-a numero de la vikirevuo MOZAIKO, kun interesaj artikoloj plejparte kun kristnaska temo, sed ne nur!

b) Nova retligilaro pri d-ro Zamenhof (omaĝe al lia naskiĝtagdatreveno)

– helpas havi superrigardon kaj rapidan aliron al materialoj pri lia vivo kaj verkaro

– vi povos ankaŭ aŭdi lian aŭtentikan voĉon kaj spekti lin en filma specimeno!

c) Kristnaskaj kantoj por elŭto – ne nur E-kantaroj sed ankaŭ sonregistraĵoj kaj videofilmetoj

d) Eĥoj de Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek – interesaj kulturaj materialoj prezentitaj dum la matineo, videofilmetoj el la programo (poezio kaj muziko), sonregistraĵo de la adventa prelego de d-ro Kašparů, fotogalerio k.a.

e) Mesaĝoj de anĝeloj kaj muzika novjara bondeziro - Inspiraj mesaĝoj printeblaj kaj distondeblaj (en la ĉeĥa versio de la retejo haveblaj ankaŭ en esperanta-ĉeĥa versio) kaj nova registraĵo de E-traduko de „Den přeslavný jest k nám přišel“

2. LA 15-AN DE DECEMBRO EN LA ĈEĤA RADIO

Laŭ instigo de Jarmila Rýznarová, la ĉiutaga komuna nokta programo de ĉiuj regionaj stacioj de la Ĉeĥa radio (Český rozhlas) - la radioforumo "Nokta linio" ("Noční linka") - dum du horoj ĉirkaŭ la noktomezo de la 15-a al la 16-a de decembro 2010 havis kiel sian temon "esperanto kaj lernado de fremdaj lingvoj ĝenerale".

Dum 74 minutoj (plus muzikpaŭzoj) la moderato akceptadis kontribuojn de aŭskultantoj el tuta Ĉeĥio, kiuj vive telefonis en la studion aŭ skribis retpoŝte. Li aparte invitis al kontribuo personojn kiuj scipovas esperanton. Enkonduke ankoraŭ, inter aliaj datrevenoj de la tago, menciigis la naskiĝtago de L. L. Zamenhof kiel motivo de la temo.

Entute aŭdiigis alvokoj de 14 personoj, 12-foje laŭtlegiĝis retmesaĝo. En la kontribuoj 14-foje oni parolis pri esperanto, 18-foje pri siaj spertoj kun fremdaj lingvoj ĝenerale. Estas pozitive, ke neniam aperis negativa opinio pri esperanto. Kelkfoje kontribuis esperantistoj, sed ankaŭ neesperantistoj plurfoje menciis sian renkontiĝon kun esperanto aŭ almenaŭ montris simpatian por ĝi.

Registraĵon de la elsendo eblas portempe elŝuti en la formato MP3 de:

http://is.muni.cz/de/172464/20101215-16_cro-regiony_nocni-linka_1.mp3

http://is.muni.cz/de/172464/20101215-16_cro-regiony_nocni-linka_2.mp3

Atentu: Entute estas 68 MB (en du partoj: la unua kaj la dua horoj).

3. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

(oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) finas la jaron 2010 per ampleksa raportado pri agado sia kaj de siaj membroj. Al la gazeto Starto (4/2010) kontribuis Marek BLAHUŠ (pri ĈEJ, La Espero) kaj Daniel MRÁZEK (Žirovnice), sur la kovrilpaĝo aperas Mirek HRUŠKA (ĈEA-konferenco en Poděbrady). Revuo Esperanto (1/2011) aperigis 2,5 paĝojn da tekstoj de Marek BLAHUŠ (interreto, KAEST, E@I, GIL), kies tekston pri KAEST aperigis ankaŭ La Ondo de Esperanto (1/2011). Tie aperas ankaŭ raportaĵo de Mirek HRUŠKA pri Žirovnice, kies malkonciza versio jam troveblas en la retpaĝaro de ĈEJ.

Okaze de la Zamenhof-tago, la Praga klubo de ĈEJ kunvenis naŭope la 14-an de decembro. En Brno kvar junuloj kunvenis jam la 24-an de novembro, poste aliaj neformale kadre de pola kaj ukraina vesperoj. Marek BLAHUŠ en Francio maltrafis la dupaĝan esperanto-anoncon de Etsuo MIYOSHI pro striko de gazetliveristoj kaj la Zamenhof-feston en Metz pro neĝa vetero. Perrete li tamen kontribuis al la programo Noční linka de la Ĉeĥa radio, same el Brno faris Michal MATÚŠOV. Al la novjara junulara renkontiĝo JES en Burg (Germanio) aliĝis 5 ĉeĥoj. Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://cej.esperanto.cz/>

4. KALENDARO DE E-EVENTOJ:

2010-12-29: Silvestra amuziĝvespero en Česká Třebová. Info: Jan Křížková, jk.esperanto@seznam.cz

2010-01-05/09 POLUDNICA en Liptovský Ján (Slovakio)

Tradicia – jam la 29-a! – vintra renkontiĝo de esperantistoj – vojaĝantoj kaj turistoj, nomita laŭ la monto Poludnica en Malaltaj Tatroj kaj organizata de Liptova Esperanto-Klubo.

Krom vintraj sportoj atendas vin ankaŭ nekutimaj sportaj aktivecoj, ripozo en termalaj basenoj kaj saŭno, diverstemaj prelegoj kaj amuziĝo.

Ĉiuj gravaj informoj (programo, kondiĉoj kaj aliĝilo) troviĝas en www.poludnica.esperanto.sk.

2011-04-1/3: La 6-a Sabla Printempo, venontjare en Milevsko.

Ĉi-foje ĝi estos dediĉita al tradukado de ĉiĉeronaj kaj ĝenerale geografiaj (vikipediaj kaj retejaj) tekstoj. Aktivaj tradukantoj ĝuos kotizrabaton! Bv. jam nun pripensi, kiun tekston vi elektos por traduko kaj alportos ĝin al la tradukseminario! Kontakto: pisek@esperanto.cz

2011-04-11/16: Lingva seminario en Skokovy. Aranĝo de AEH, sed ne nur por handikapitoj. Info: nechvilep@seznam.cz

2011-05-07/14: La 63-a IFEF-kongreso, Liberec, Kongresa centro Babylon. Info: www.ifef.wz.cz aŭ ladislav.kovar@tiscali.cz

2011-06-04: Inaŭguro de nova ekspozicio en Esperanto-Muzeo Svitavy pri la temo „Esperanto kaj spiritaj tradicioj de la mondo“, enkadre de Muzea nokto. Info: dvor.libuse@seznam.cz

2011-06-10/12: Solenaĵo omaĝe al centjariĝo de Esperanto-klubo en Olomouc. Info: dudajanol@centrum.cz

2011-06-18: Infana tago en Svitavy. Info: dvor.libuse@seznam.cz

2011-06-19: Tradicia renkontiĝo (jam 75 jarojn!) de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj sur la pinto de la monto Ĉantorio sur ĉeĥa-pola landlimo. Info: suchanekj@seznam.cz

2011-06-25 bonvenigos vin esperantistoj el Pardubice ĉe 17-a ESPERANTO-TAGO.. Rezervu la lastan sabaton de junio kaj venu. La invitilon oni sendos en aprila Informilo. Inf.: aeh-ikeh@volny.cz, tel. 466 611 941.

2011-07-03-/16, 07-17/30, 07-31/08/13: Tri etapoj de la 59-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov apud Vranov-lago. Info: podhradaska@volny.cz

2011-07-14/21: Kongreso de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) en Olomouc. Info: priborsky@brailnet.cz

2011-08-02/09: Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) en Poděbrady. Info: cea.polnicky@quick.cz

2011-08-12/14: Renkontiĝo de iamaj partoprenintoj de Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov. Info: podhradska@volny.cz

2011-09-10: Postferia renkontiĝo en Putim. Info: pisek@esperanto.cz

2011-09-11/18: EKOTUR 11. Tradicia ekoturisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj en Dobřichovice (itinerroj en Bohemia Karsto kaj montetaro Brdy). Info: www.kava-pech.cz/ekotur aŭ chrdle@kava-pech.cz

2011-10-07/09: Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Šumperk Info: Tomecek@esperanto.cz, brzy také budou podrobnější informace na www.esperanto.cz

2011-12-10: Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek. Info: pisek@esperanto.cz

2012-julio: Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Svitavy. Tutsemajna aranĝo kies temo estos „Sciencfikcia literaturo kaj robotoj“

2012-julio: Flugkaravano al Vjetnamio lige al Universala kongreso de Esperanto en Hanojo.

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al chrdle@kava-pech.cz. Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

Por resti daŭre informataj pri la Esperanto-aranĝoj bv. sekvi <http://www.esperanto.cz/cs/akce>

Atentu, ke la plej kompletan kalendaron de Esperanto-eventoj en la tuta mondo, sed ankaŭ plurajn utilajn informojn, vi trovos ĉe www.eventoj.hu

5. BONDEZIROJ

Nome de la redaktokonsilio de ĈEA-retkomunikoj kaj ankaŭ propranome mi deziras al ĉiuj abonantoj de la ĈEA-retkomunikoj agrablajn kristnaskajn kaj jarŝanĝajn festotagojn kaj sukcesan jaron 2011.

Petro Chrdle, redaktoro de ĈEA-retkomunikoj